

JARO II.

N.º 19.ª *

LA SUNO HISPANA

Kongreso

Jam estas proksimaj la tagoj en kiuj la esperantistoj kunvenontaj en Boulogne-sur-Mer devas konsenti gravajn decidojn por la sukceso de Esperanto. La boneco de nia entrepreno malpermesas ke ĝi falu, pro la batoj de la homaj malperfektaĵoj, sed la neuniĝo inter la esperantistoj kaj la laborado pli malpli kaŝita kontraŭ la nediskutebla aŭtoritato de la elpensinto de la lingvo, nia kara kaj tro modesta doktoro Zamenhof, sendube prokrastus nian definitivon triumfon, kaj eĉ kontraŭstarus tiujn, kiujn ni jam atingis.

La submetiĝon, kiun publike montras la leŭtenantoj de nia nediskutebla kapitano, estas por ĉiuj laŭdiada kaj sekvida ekzemplo. Ni ne estu malhumilaj, ne forgesu la malsimilecon kiu ekzistas inter la kapo kaj la korperoj, kaj ni ĉiam pensu ke estas S-ro Zamenhof kiu donis al ni la lingvon internacian kaj ni kiuj profitas la elpenson.

Ni alportu gravuritaĵojn en niaj koroj la jenajn vortojn de nia glora Zamenhof, artikolo presita en «Lingvo Internacia»:

«Se ni deziras ke nia Kongreso ne faru fiaskon, ni devas antaŭ ĉio aperi al la Kongreso ĉiuj kvazaŭ fratoj, entuziasme kaj sindone ligitaj per unu amata ideo, kiu devas esti por ni, almenaŭ en la tagoj de la Kongreso, pli sankta ol ĉiuj diversaj personaj ambicioj; kalkuloj, kapricoj aŭ opinioj, ĉiu el ni, kredeble, havos la eblon esprimi en la kongresiano opinion pri tiu aŭ alia punkto, sed

Congreso

Ya se aproximan los días en los cuales los esperantistas que se han de reunir en Boulogne-sur-Mer han de tomar importantes decisiones para el éxito del Esperanto. La bondad de nuestra empresa impide que caiga á los golpes de las humanas debilidades, pero la desunión entre los esperantistas y el trabajo más ó menos oculto contra la indiscutible autoridad del inventor de la lengua, nuestro querido y demasiado modesto doctor Zamenhof, indudablemente retrasaría nuestro definitivo triunfo, y hasta se opondría á los que ya hemos logrado.

La sumisión que públicamente demuestran los tenientes de nuestro indiscutible capitán, son para todos ejemplo digno de elogiar y seguir. No seamos soberbios, no olvidemos la diferencia que existe entre la cabeza y los demás miembros del cuerpo, y pensemos siempre que es él, el Sr. Zamenhof, el que nos ha dado la lengua internacional, y nosotros los que aprovechamos el invento.

Llevemos grabados en nuestros corazones las siguientes palabras de nuestro glorioso Zamenhof, tomadas de un artículo que imprimió «Lingvo Internacia»:

«Si deseamos que nuestro Congreso no haga fiasco, debemos ante todo presentarnos todos á él como si fuéramos hermanos, con entusiasmo y consagradamente ligados por una idea amada, que debe ser para nosotros, al menos en los días del Congreso, más santa que todas las diversas ambiciones personales, cálculos, caprichos ú opiniones. Cada uno de nosotros, naturalmente, puede expresar

ĉiu devas tion ĉi fari trankvile kaj senpasiĉe, kaj ne batali kontraŭ la decidoj de la plimulto; neniu devas peni altrudisian opinion aŭ volon, neniu devas kolekti, se lia opinio ne estos akceptita.»

La kolonoj kaj eĉ la ekzistado de LA SUNO HISPANA estas submetataj al la ordonoj de D-ro Zamenhof. Kun varma kaj frata estimo ni salutas lin, la kongresanojn kaj ĉiujn esperantistojn, dezirante ke la ĉielo lumigu al ili.

Eble, kelkaj el niaj redaktoroj ĉeestos en la Kongreso, kiuj kun la ceteraj hispanaj geesperantistoj tie kunvenontaj, prezentos nian gazeton en la grava kaj memorinda kolektiĝo.

Ankaŭ mi volonte sciigas, laŭ peto de la hispana Societo por propagando de Esperanto kaj de la Murcia kaj Valencia grupoj, ke ope prezentos ilin en la Kongreso, la tie ĉeestantaj anoj de kiu ajn el tiu societoj.

AUGUSTO JIMÉNEZ LOIRA.

en el Congreso su opinión respecto á tal ó cual punto, pero todos deben hacer esto tranquilamente y sin pasión, y no luchar contra las decisiones de la mayoría; nadie debe imponer su opinión ó voluntad, nadie debe incomodarse si su opinión no fuera aceptada.»

Las columnas y hasta la existencia de LA SUNO HISPANA se someten á las órdenes del Dr. Zamenhof. Con caluroso y fraternal afecto lo saludamos, y á los congresistas y á todos los esperantistas, deseando que, el cielo los ilumine.

Es posible que alguno de nuestros redactores asistan al Congreso, los cuales, con los demás esperantistas españoles de ambos sexos que allí se reunan, representarán nuestro periódico en la importante y memorable asamblea.

También tengo el gusto de manifestar á petición de la Sociedad española para la propagación del Esperanto y de los grupos de Murcia y Valencia, que colectivamente los representarán en el Congreso los socios allí presentes, de cualquiera de estas sociedades.

AUGUSTO JIMÉNEZ LOIRA.

For ŝi estas

de W. v. Goethe.

Mi do vin perdis efektive?
Ho belulin' forkuris vi?
Ĉiuj viaj vortoj plenvive
Resonas en orel'al mi.

Kiele serĉas mirigate
Migranto vane ĉirkaŭ si,
Se, en bluaĵoj elkaŝate,
Alaŭdo kantas super li:

Mi tiel serĉas en konstanto
Tra kamp' kaj tra arbar' sen fin'
Vin vokas ĉiu mia kanto;
Al mi revenu, amatin'!

Tradukis BIRJER STROM.

Lejos ella está

de W. v. Goethe

Te perdí, pues, en efecto?
¿De mí, ¡oh hermosa!, has huído?
Lleno de vida tu acento
Resuena todo en mi oído.

Como admirado rebusca
El emigrante á su lado
Si en los azules oculta
Canta la alondra en lo alto;

Así busca mi constancia
En el campo y selva umbría;
Todo mi canto te llama;
Vuelve á mí, ¡oh amada mía!

Hispanigis REV. P. A. GUINART.

Sciigoj

Nia bona amiko kaj fervora esperantisto S-ro D-ro Villareal perdis sian karan Erneston, la 29^{an} de la lasta Aprilo kun kvar-dek tagoj de febro tifusa, kio okazigas gravan damaĝon por Esperanto, ĉar la juna mortinto estis ankaŭ entuziasma esperantisto. Ni sendas nian kondolencan al la malĝojigita patro kiu skribas al ni ke submetiginta je la diavolo, li daŭrigos sian laborojn, tiel utilaj por la scienco kaj por nia esperanta celo. Pro tio kvankam la revuo, de li direktita «Antaŭen Esperantistoj» ne eliris en Aprilo, eldonis tamen numeron en Majo.

Amerikaj Uningitaj Ŝtatoj.—«The British Esperantist» sciigas nin ke la Kanada gazeto «La Lumo» ne eliros plu, kaj ke «La Brita Esperantisto» estos de nun la oficiala organo de la klubo «Progreso» de Montreal.

Anglujo.—Nova grupo fondiĝis en Southampton. Laŭ «The British Esperantist» la tri malgrandaj urboj *Plimouth*, *Devouport* kaj *Stokenhouse* interligis sin kaj fondis unu grupon.

Francujo.—Baldaŭ aperos la «Tutmonda jarlibro de la Esperantistoj por 1905» tiel interesa kiel la eldonita por 1904.

Nova gazeto titolita «Esperanto», aldonas al ni. Ni deziras ke la plej granda sukcesado premidonu siajn klopodojn proponandi nian karan lingvon. Ĝi estas eldonata en Perpignan-o, la administrado ĉe S-ro Berthelot, Ceret, la redaktado ĉe S-ro Lambert, Dijon, kaj la abonoj estas listotaj ĉe S-ro Emile Gasse, 71, Michelet, le Havre. 24 numeroj sinsekvaj: 3 fr. por tutmonda.

Noticias

Nuestro buen amigo y fervoroso esperantista el Sr. Dr. Villareal ha perdido á su querido hijo Ernesto el 29 de Abril último, después de cuarenta días de fiebre tifoidea, lo cual ocasiona importante perjuicio al Esperanto, porque el joven fallecido era también entusiasta esperantista. Enviamos nuestro pésame al afligido padre, el cual nos escribe que sometido á la voluntad de Dios, continuará sus trabajos, tan útiles á la ciencia como á nuestra causa esperantista. Como consecuencia, aun cuando la revista «Antaŭen Esperantistoj», que dirige, no se publicó en Abril, editó doble número en Mayo.

Estados Unidos de América.—«The British Esperantist» nos comunica que la revista canadiense «La Lumo» no se publicará más, y que «La Brita Esperantistoj» será desde ahora el órgano oficial del club «Progreso» de Montreal.

Inglaterra.—Se ha fundado un nuevo grupo en Southampton.

Según «The British Esperantist», las tres próximas poblaciones, *Plimouth*, *Devouport* y *Stokenhouse* se han unido y han fundado un grupo.

Francia.—Pronto aparecerá el «Anuario universal de los Esperantistas para 1905», tan interesante como el que se editó para 1904.

Ha llegado á nosotros un nuevo periódico titulado «Esperanto». Deseamos que el mayor éxito premie sus propósitos de propagar nuestro querido idioma. Se edita en Perpiñan, la administración está en casa del Sr. Berthelot, en Ceret, la redacción en casa del Sr. Lambert en Dijon, y los abonos se han de hacer en casa del Sr. Emile Gasse, 71, Michelet, le Havre. 24 números consecutivos: 3 francos en todo el mundo.

Hungarujo —Laŭ «Germana Esperantisto» aperis nova hungara esperanta gazeto, eldonata en Budapest kaj ankaŭ titolita «Esperanto». Ni deziras ĝian plenan sukceson.

Italujo. —Ni ricevis la novan gazeton, «Gefratro Esperanta» al kiu ni deziras longan, bonan vivon kaj disvastigon de nia kara lingvo en tiu belega lando. La jarabono estas 2 frankoj tie kaj 4 frankoj en eksterlandoj. Adreso: Largo Gesù e Mario, n.º 4, Napolo.

Meksikujo. —Diras la «Meksika Lumturo» ke oni ricevis de S-ro D-ro Diaz, direktoro de la Prepara Lernejo en *Orizaba* permeson fari en ĝi kurson de Esperanto. Tiuj protektoj de gravaj personoj al Esperanto, helpas ĝin kaj montras ilian progresemon. Ni gratulas niajn karajn meksikajn fratojn kaj respektive salutas sinjoron Diaz.

Peruo. —«Antaŭen Esperantistoj» en siaj numeroj Aprila-Maja, enpresas belan artikolon titolitan «Strukturo de Esperanto». Post plena kaj klara elmondo de la gramatiko, prezentas vastan paciencon, mirindan laboron, komparan inter la konitaj esperantaj vortaroj, kiu estas en ĝi mem belega vortaro de novaj radikoj. Ni ĉiam rekomendis tiun gazeton. Hodiaŭ ni rekomendegas la cititajn numerojn.

Rusujo. —«Lingvo Internacia» enpresas leteron de D-ro J. Ostrowski redaktoro eldonisto de la rusa gazeto «Esperanto», sciigante ke li devigas iomtempe interrompi la eliradon de tiu revuo, kiu poste publikiĝos en Petersburgo.

Hispanujo. —«Museo Exposición», en sia 120^a numero rilatas afable al ni afero. Ni pri tio multe dankas.

La lastajn tagojn de Aprilo *Barcelona* vidis sin honoratan per la vizito de diversaj francaj esperantistoj, alvokitaj por

Hungria. —Según «Germana Esperantisto» ha aparecido un nuevo periódico húngaro esperantista editado en Budapest y también titulado «Esperanto». Deseamos su éxito completo.

Italia. —Hemos recibido el nuevo periódico «Gefratro Esperanta» al que deseamos larga, buena vida y difusión de nuestro querido idioma en aquel bellísimo país. El abono anual es de 2 fr. allí y en el extranjero. Dirección: Largo Gesù e Mafio, núm. 4, Nápoles.

Méjico. —Dice «La Meksika Lumturo», que se ha recibido del Sr. Dr. Diaz, director de la Escuela Preparatoria de *Orizaba*, permiso para dar en ella un curso de Esperanto. Tales protecciones de personas importantes, al Esperanto, ayudan á este y demuestran el amor de aquellas al progreso. Felicitamos á nuestros queridos hermanos mejicanos y saludamos respetuosamente al Sr. Diaz.

Perú. —«Antaŭen Esperantistoj», en su número de Abril-Mayo inserta un hermoso artículo titulado «Estructura de Esperanto». Después de completa y clara exposición de la gramática, presenta un vasto trabajo de paciencia admirable, comparativo entre los diccionarios de Esperanto conocidos, que es por sí mismo un magnífico diccionario de raíces nuevas. Siempre hemos recomendado esta revista. Hoy recomendamos muchísimo los citados números de ella.

Rusia. —«Lingvo Internacia» inserta una carta del Dr. J. Ostrooki, redactor editor del periódico ruso «Esperanto», haciendo saber que se ve obligado a interrumpir temporalmente la publicación de esa revista que se publicará posteriormente en Petersburgo.

España. —«Museo Exposición» en su número 120 se refiere con afecto á nuestro asunto. Lo agradecemos muchísimo.

En los últimos días del mes de Abril *Barcelona* se vió honrada con la visita de varios esperantistas franceses cuando

estis en la unua kunveno de la *Federo Esperantista de Katalanujo*, Societo kreita de S-ro Berthelot en la celo propagandi Esperanton, en la regionoj, kie oni parolas la lingvon katalanan.

Je la tria horo postagmeze de la 24^a de Aprilo okazis efektive la unua kunveno de la Federo en la Stenografia Akademio de Barcelono sub prezido de S-ro Berthelot, Boirac, Ribot, Sabadell kaj Inglada. Ĉeestis tie la delegitoj kaj membroj de la Societo kaj multaj esperantistoj antaŭe invititaj. Ni precipe rememoras pri S.^{oj} J. Baron (delegito) kaj E. Cuilhé el Perpignan, E. Segarra (delegito) kaj V. Lassalle el Manresa, J. Boviac, J. Bourjade, prezidanto de la Grupo esperantista de Narbonne, S.^{ino} J. Flourens, prezidantino de la virina Grupo de Béziers, F.^{oj} Z. Fabre kaj V. Commérese, sekretariino kaj kasistino respektive de la unua, C. Subirá, prezidanto de la Grupo de Cardona, kaj multaj fremdaj fraŭlinoj, kalkulante la barcelonajn geesperantistojn.

Oni diskutis kaj aprobis—kompreneble en Esperanto—la paragrafojn de la Regularo de la Societo, oni konsentis prokrasti ĝis la plej proksima kunsido la elekton de prezidanto kaj konservi en sia ofico la sekretarion, S-ro Berthelot, kaj delegitojn kaj oni unanime decidis, ke la dua jara kunveno de la Federo okazos lokon en Amélie-les-Bains en Aŭgusto de 1906.

Post la kunsido la geesperantistoj sin kolektis en la *Maison-Doré* kie okazis amfara festeno, kiu finiĝis per la elokventaj toastoj de S-ro Boirac, Berthelot, Inglada kaj Sabadell, en kiuj oni voĉdonis por la prosperado de Esperanto, kaj de la Federo de Katalanujo kaj oni decidis adresi gratulegramon al la eminenta D-ro Zamenhof, elpensinto de Esperanto.

Tiel bela festo finiĝis per publika prezentado ĉe teatro Fivalier je la 9 1/2 vespere. Bonegajn paroladojn en la lingvo franca, esperanta, kastila kaj katalana faris S.^{oj} Boirac, Berthelot, Rodrigo kaj Subirá. Tuj sekvis kanto de himno *La*

cados para asistir á la primera sesión de la *Federación Esperantista de Cataluña*, Sociedad creada en 1904 por Mr. Paul Berthelot con el objeto de propagar el Esperanto en las regiones que hablan la lengua catalana.

A las tres de la tarde del 24 de Abril tuvo lugar, efectivamente, la primera reunión de la *Federación* en la Academia de Taquigrafía de Barcelona bajo la presidencia de los Sres. Berthelot, Boirac, Ribot, Sabadell é Inglada. Asistieron al acto los delegados y miembros de la Sociedad y muchos esperantistas previamente invitados. Recordamos principalmente á los Sres. J. Barón (delegado), y E. Cuilhé de Perpignan, E. Segarra (delegado) y V. Lasalle de Manresa, J. Boirac, P. Bourjade, presidente del Grupo de Narbona, Sra. J. Flourens, presidenta del Grupo de Béziers, Srtas. L. Fabre y V. Comméres, secretaria y cajera, respectivamente, del mismo, E. Subirá, presidente del Grupo de Cardona y muchas señoritas extranjeras, sin contar con los esperantistas de Barcelona.

Se discutieron y aprobaron—en Esperanto, naturalmente—los artículos del Reglamento de la Sociedad, se acordó diferir hasta la sesión próxima la elección de presidente, y mantener en su cargo al secretario Sr. Berthelot y delegados, y se decidió unánimemente celebrar en Amélie-les-Bains la segunda reunión anual de la Federación en Agosto de 1906.

Después de la sesión, los esperantistas se reunieron en la *Maison-Dorée*, donde celebróse un banquete fraternal que fué terminado con los elocuentes brindis de los Sres. Boirac, Berthelot, Inglada y Sabadell, en que se hicieron votos por la prosperidad del Esperanto y de la Federación de Cataluña, y se decidió dirigir un telegrama de felicitación al eminente Dr. Zamenhof, inventor del Esperanto.

Tan hermosa fiesta terminó con una función pública representada en el teatro Fivalier á las nueve y media de la noche. Pronunciaron excelentes discursos de propaganda en los idiomas francés, esperanto, castellano y catalán, los señores

Espero kaj *La Vojo* hore farita de la fremdaj fraŭlinoj kaj prezentado de la interesa komedio *La Supujo*, esperanten tradukita de S-ro Meyer, kaj en kiu F.^{noj} J. Flourens, V. Commères kaj L. Fabre ludis respektive la rolojn de S-ro Honduras, S.^{ino} Spoon kaj servisto, kun granda plaĉo por la publiko, kiu multege aplaudis la lertecon de la alilandaj artistinoj.

Sekve de tiaj festoj elvekiĝis en Barcelono granda movado propaganda favore je Esperanto, kiel ĝin pravas la artikoloj presitaj en «El Noticiero Universal», «El Liberal» kaj «La Vanguardia», ĉefaj ĵurnaloj de la ĉefurbo katala kaj oni malfermis kurson esperantan ĉe la societo de la Progreso al kiu alestas pli ol 50 lernantoj.

La ĉeesto de la francaj geesperantistoj en Barcelona dum 4 aŭ 5 tagoj pruvis unu fojon pli la mirindajn ecojn de reciproka interkompreniĝo, kiujn posedas Esperanto kaj elmontris la kunkoran rilatecon ekzistantan inter ĉiuj, kiuj dediĉas sin al lernado kaj uzado de la lingvo internacia.

La barcelonaj esperantistoj konstatis la senegalan plezuron, kiun faris al ili la persona interkonatiĝo kun iliaj francaj semideanoj kaj tutkore dankas ilin por ilia amindeco fari al ili viziton, kies feliĉa rememoro neniam malaperos.

Boirac, Berthelot, Rodrigo y Subirá. Siguó inmediatamente el canto del himno *La Espero* y de *La Vojo* á coro por las señoritas extranĝeras y la representación de la interesante comedia *La Supera*, traducida al Esperanto por S. Meyer, y en la que las Srtas. J. Flourens, V. Commères y J. Fabre desempeñaron respectivamente los papeles de Sr. Honduras, de Sra. Spoon y de criado, con gran agrado del público, que aplaudió muchísimo la habilidad de las artistas extranĝeras.

A consecuencia de estos festejos se ha despertado en Barcelona un gran movimiento de propagada en favor del Esperanto, como lo prueban los artículos publicados en «El Noticiero Universal», «El Liberal» y «La Vanguardia», diarios principales de la capital catalana, y se ha abierto un curso esperantista en el centro del Progreso, al que asisten más de 50 alumnos.

La presencia de los esperantistas franceses en Barcelona durante cuatro ó cinco días ha demostrado una vez más las condiciones maravillosas de comprensión recíproca que posee el Esperanto y ha puesto de manifiesto la gran cordialidad de relaciones existentes entre los que se dedican al estudio y uso de la lengua internacional.

Los esperantistas barceloneses han constatado el placer sin igual que les ha ocasionado el conocer personalmente á sus compañeros franceses, y les dan gracias de todo corazón por su amabilidad en hacerles una visita, cuyo feliz recuerdo no se borrará nunca de su memoria.

La ĉiela fajro

La legendo pri Prometeŭso, rabinto de l' fajro, estas rakontata eĉ en la ŝovagulaĵoj tendoj de la negroj de Afriko, sed la fabelo estas tre diferenca kompare je tiu, kiun ni konas.

Je la komenco de l' mondo, la homoj

El fuego del cielo

La leyenda respecto á Prometeo, el rabadador del fuego, se cuenta hasta en las tiendas salvajes de los negros de Africa, pero la fábula es muy diferente comparada con la que nosotros conocemos.

Al principio del mundo, los hombres

ne havis fajron: ili deziris la fajron ĉielan. Negro supreniris por preni ĝin. Alveninte en la unuan ĉielon, tiu negro ekvidis homojn, kiuj havas nur duonan korpon, kaj tio igis lin ridi. En la dua ĉielo, li vidis homojn paŝantajn kapomalsupre, kaj li mokis ilin. La loĝantoj de la tria ĉielo, sin trenis sur la genuoj: li nomis ilin limakoj. Alveninte fine en la kvaran ĉielon, loĝejon de dio Mulungu, la negro, genufleksinte antaŭ la Ĉiopovulo, klarigis sian peton. — «Revenu morgaŭ—respondis Mulungu—kaj ci trovos fajron.» La morgaŭan tagon, la negro, akceptita de Mulungu, ekvidis, antaŭ la dio, dekon da vazoj oraj, ornamitaj je mirindaj ĉizajoj, kaj du sensignifajn potojn terajn, je la plej maldelikata elvido: — «Elektu!» — diris Mulungu. La negro, ne ŝanceliĝante, prenis la plej ornamitan vazon: li trovis en ĝi nur cindron. — «Kial,—demandis la dio—ci ridis je miaj infanoj ilin renkontinte sur cia vojo? Ĉu estas do nenio ridinda sur la tero? Reiru tien? La fajro ne estas por ci!»

Diversaj aliaj viroj refaris la vojaĝon: neniu el ili pli bone prosperis. Fine, virino decidis fari la provon. Vojirante, ŝi vidis la ĉielajn loĝantojn havantajn nur duonan korpon; tiujn kiuj paŝadis sur la genuoj; ĉiujn ŝi gratulis pro ilia bela teniĝo; ŝi laŭdis ilian paŝadon, ilian gracion, ilian talenton. Antaŭ Mulungu, ŝi kantis kaj dancis. Kiam oni prezentis al ŝi la vazojn orajn kaj la argilajn potojn, ŝi diris: «Tiuj estas tro belaj por mi», kaj ŝi elektis modeste unu el la ujoj teraj, kaj en ĝi, ŝi trovis la fajron! De tiu ĉi tempo, la virinoj estas konsiderataj kiel pli ruzemaj ol la viroj, en la tuta regiono Wagogo.

Tradukis L. COGEN.

no tenian fuego y desearon el fuego celestial. Un negro subió á tomarlo. Al llegar al primer cielo, aquel negro observó unos hombres que tenían solamente medio cuerpo y ello le hizo reir. En el segundo cielo vió á unos hombres que iban cabeza abajo y se burló de ellos. Los habitantes del tercer cielo se arrastraban sobre las rodillas: él les motejó de caracoles. Habiendo llegado, por último, al cuarto cielo, alojamiento del dios Mulungu, el negro, arrodillándose ante el Todopoderoso, le explicó su petición. — «Vuelve mañana—respondió Mulungu—y encontrarás fuego.» Al día siguiente el negro, recibido por Mulungu, vió ante el dios una docena de vasos de oro adornados de admirables cincelados, y dos insignificantes vasijas de barro del más grosero aspecto. — «¡Elige!»—dijo Mulungu. El negro, sin vacilación, tomó el más adornado vaso: encontró en él sólo ceniza — «¡Por qué—le preguntó el dios—te has reído de mis hijos cuando los encontrabas en tu camino? ¿Es que no hay nada digno de risa en la tierra? ¡Vuelve á ella! El fuego no es para ti.»

Varios otros hombres repitieron el viaje: ninguno de ellos obtuvo mejor éxito. Finalmente, una mujer decidió hacer la prueba. En el viaje vió á los habitantes del cielo que sólo tenían medio cuerpo; á los que iban de rodillas; á todos felicitó por su bella apostura, alabó su paso, su gracia, su talento. Delante de Mulungu, cantó y bailó. Cuando le presentaron los vasos de oro y las vasijas de barro, dijo: «Aquéllos son muy bellos para mí», y eligió modestamente uno de los recipientes de tierra y en él encontró el fuego. Desde entonces, las mujeres son consideradas como más astutas que los hombres, en toda la región de Wagogo.

La ŝuisto ⁽¹⁾

Ĉe la komenco de l' jarcento XIX^a loĝadis en la hispana ĉefurbo onklo Tomaso Krispo, malriĉa ŝuisto, aŭ pli-ĝuste, fikisto de ŝuoj, kiu havis sian simplan metiejon en la vestiblo de malnova domo de l' fama strato de Lavapiés, centro kaj paradizo de la manolaro (2). Onklo Krispo, nur konata per lia finomo «onklo Vaksajo», estis bonega kristano, konscienshava metiisto, eĉ laborema... sed ne la festtagojn... kaj iliajn posttagojn. Li dediĉis la unuajn, antaŭ ol ĉio, por aŭdi meson, kaj poste, por trinkadi vinon, kiel eble plej rapide... kaj sufiĉege! Tiamaniere, je la deka horo matene nia viro ja ne estis homo, sed reala barelo da vino. Tiel, li prenadis tion, kion tiam oni nomis la «simino», poste la «filoksero», kaj ĉiam «turkino», tiel gravan ke li pace dormadis ne nur la tutan tagon, sed eĉ iafoje la lundan nokton. Kiam okaze li vekigis antaŭ la lunda vespero, li akurate iris en amikan vinvendejon, kaj dank' al kvar aliaj glutadoj de sama fluidaĵo, li dolĉe eniris en la mardan tagon. Tiam Vaksajo fervore repreneis sian martelon kaj senĉese frapadis sur la ledon, jen por ĝin alformigi al ligna formilo, jen por trapuŝi najlojn, celante fiksadi kalkamunon en ŝuego de galica akvoportisto.

Foje, du ŝercemaj manoloj, kun tranĉilo en la zonvesto, ronda ĉapelo, harligeto, vangharoj hakilformaj kaj la karakteriza hispana mantelo, por sin kaŝi ĝis la okuloj, eniris dum la nokto ĉe sian najbaron, la jam ebrian Vaksajon, razis iliajn vang kaj vertharojn, farante vastan rondan senharaĵon, envestis al li monaĥan robon, per portilo senbrue transportis lin apud la pordegon de la fama monaĥejo de Sankta Francisko, kaj la du buboj forkuris.

(1) Konata hispana fabelo.

(2) Manolo, estis tiam alnomo ĝenerala de popolaj madridanoj, speciale vestitaj.

El zapatero ⁽¹⁾

A principio del siglo XIX vivía en la capital de España el tío Tomás Crispo, zapatero pobre, ó más propiamente, zapatero remendón, que tenía su sencillo taller en el portal de una casa vieja de la famosa calle de Lavapiés, centro y paraíso de la manolería (2). El tío Crispo, sólo conocido por su mote «tío Cerote», era un buen cristiano, concienzudo artesano, hasta trabajador... pero no los días de fiesta... y siguientes á ellos. Dedicaba los primeros, antes de todo, á oír misa, y después á beber vino lo más á prisa posible... y de sobra! De este modo, á las diez de la mañana nuestro hombre ya no era persona, sino realmente un barril de vino. Así, él tomaba lo que entonces se llamaba la «mona», después la «floxera» y siempre «una turca», tan fuerte que dormía tranquilamente no sólo todo el día, sino alguna vez hasta la noche del lunes. Cuando por acaso se despertaba antes de la tarde del lunes, con exactitud se dirigía á una taberna amiga, y merced á otros cuatro tragos del mismo líquido, dulcemente entraba en el día del martes. Entonces Cerote fervorosamente volvía á cojer su martillo y sin cesar golpeaba la suela, ya para adaptarla á la horma, ya para clavetearla con el fin de fijar un tacón al zapatote de algún aguador gallego.

Una vez, dos manolos burlones, con cuchillo en la faja, sombrero redondo, coleta, patillas bocachas y la característica capa española, para taparse hasta los ojos, entraron en casa de su vecino, el ya borracho Cerote, le afeitaron la cara y cabeza haciéndole una amplia corona, le vistieron un hábito de monje, le transportaron silenciosamente, en unas parihuelas, cerca de la puerta del famoso monasterio de San Francisco, y los dos tunantes escaparon.

(1) Conocido cuento español.

(2) Manolo, era entonces nombre general de madrileños del pueblo, vestidos de manera especial.

Monaha servisto, kiu piedirante alve-
nis je la deka horo vespere, frapis tri
fojojn al la pordego, kaj tuj, sub la luna
lumo ekvidis onklon Vaksajon, kiu kuŝis
de angulo de la granda konstruaĵo. Tiam,
li pensis ke surprizita de subita malsano,
li malfeliĉulo sveniĝis kaj falis teren,
sed ja ne dubis ĉu estas mortinta, ĉar la
spirado estis ne forta sed fortega, eĉ li
sonkis tute senharmonie... Kiam frato
pordisto faris sian devon, ili ambaŭ eni-
niĝis la ebrulon, kuŝigis lin sur liton
pretegitan en la gastejo... kaj tiam, ili
jam divenis la kaŭzon de la malsano, ĉar
akra vinodoro denunciis ĝin.

Kiam la taga lumo ekkomencis, am-
baŭ monaĥoj rakontis la aferon al la
abato moŝto... Tiu ĉi, ĉirkaŭita de siaj
plej gravaj kunuloj, sin preparis por se-
vere riproĉi kaj puni la malsobrunon,
kaj unue per dolĉaj vokoj poste per for-
taj krioj kaj movadoj, sukcesis ekveki
sian bonan Krispon. Tiu ĉi, pli miregigita
ol ĉiuj ĉestantoj, ĉirkaŭrigardis kaj poste,
iom altigante siajn ŝultrojn kaj ferman-
te la palpebrojn, kuŝiĝis por rekomenci
la dormadon. Tiam, la indignita abato
demandis lin, kiu li estas. Onklo Vaksajo
post kiam li regardis sian robon kaj tak-
tis siajn vangojn kaj verton, malrapide
kaj balbutante respondis: Irigu monaĥon
al la strato Lavapies, li demandu pri la
onklo Vaksajo: se tiu ĉi ne estus hejme,
mi estas li, tamen se li estus tie, mi nes-
cias kiu mi estas.

R. CODORNIU.

Un criado de los frailes que á pie
volvía á las diez de la noche, llamó tres
veces á la puerta, y en seguida, á la luz
de la luna, vió al tío Cerote tendido en
un rincón del gran edificio. Entonces
pensó que aquel desdichado, sorprendido
por súbito mal se había desmayado y
caído á tierra, pero desde luego no dudó
respecto á que estuviese muerto, porque
la respiración no era fuerte, sino fuertí-
sima, como que roncaba inarmónicamen-
te... Cuando el hermano portero cumplió
con su deber, ambos entraron al borra-
cho, le acostaron en una cama dispuesta
en la hospedería... y entonces ya adivi-
naron la causa de la enfermedad porque
un penetrante olor de vino la denunció.

Al comenzar la luz del día, ambos
monjes refrieron el caso al reverendo
abad... Este, rodeado de sus más impor-
tantes compañeros se preparaba á re-
prender y castigar al intemperante, y
primeramente por dulces llamadas, luego
por fuertes gritos y sacudidas, lograron
despertar á nuestro buen Crispo. Este,
más admirado que todos los presentes,
miró al rededor y posteriormente, alzando
un poco los hombros y cerrando los
párpados se acostó para volver á cojer el
sueño. Entonces el indignado abad le
preguntó quién era. El tío Cerote, cuando
hubo visto su traje y palpado sus
mejillas y coronilla, despacio y balbu-
ceando contestó: Haced ir á un fraile á
la calle de Lavapiés, que pregunte por el
tío Cerote: si éste no estuviera en casa,
yo soy él, pero si él estuviera allí, yo no
sé quién soy yo.

Animo patrina

Mi ja certege scias ke tiuj ĉi aferoj
interesas neniu. Oni ĝin rakontas ĉe
tablo de kafejo kaj senbezone la aŭskul-
tintoj malgajigis. Rakonti ĝin al fianĉino
estas granda idiotiĵo; la ĉiamaj antaŭ-
sajtaj frazoj de la amo, sonas multe pli-
bone en siaj delikataj oreloj. Ĝi ĉagrenas

Alma de madre

Ya sé yo que estas cosas no interesan
á nadie. Se cuentan en la mesa de un
café y se entristecen, sin necesidad, los
que las escuchan. Contárselo á una no-
via es bobería; las eternas frases conven-
cionales del amor suenan mejor en sus
delicados oídos. A un amigo es enojarlo

amikon kaj per ĝi, oni nur atingas lian pardon. Kvankam mi deziregas tute ĝin forgesi, mi neniel sukcesas tion fari. El miaj okuloj eliras larmoj kaj eĉ ekraŭkiĝas mia voĉo. Fine, ŝi estis mia patrino kaj oni neniam havas pli ol unu patrino.

Ĝi amis min adore, ŝi jam malfeliĉe mortis kaj kun ŝi ankaŭ finiĝis ĉiuj miaj vivplezuroj. Kelkajn noktojn ankoraŭ, kiam malfruiĝas mia dormo kaj remoriĝas ĉiufanke mia korpo en la lito, malfermante miajn lacigitajn okulojn, mi vidas tiam en senlumeco de la ĉambro, karan figuron ŝian, tiun figuron, kiu, desegnita per lumaj maldiketaj skizoj, rigardadas min tiel same kvazaŭ ŝi volus diri al mi: tre kara filo mia!

Tiuj ĉi momentoj, tiuj ĉi ideoj kaj tiuj ĉi revoj estas vere nerakontebaj; eĉ pli bone oni agas forgesante ilin. Ĉiuj diras pri rakontanto: jen estas unu poeto! Kaj unuj kompatas lin dum aliaj rigardas liu mokeme.

Ho, kara patrino mia! Vian grandegan amon mi rakontos al neniuj. La eterna amo ĉiam estos sekreto eterna por tiu ĉi mizera mondo!

Mi estis la sola filo kiun ŝi naskis dum sia unua edzineco. Poste la vivaj bezonoj, manko de helpado kaj ŝia malfeliĉa juneco devigis ŝin edziniĝi duafoje.

Mia duonpatro vere amis min kiel lian propran filon, kaj mi nenian malamon havas al lia memoro. Mi havis kvar duonfratojn, sed reale mi devas diri ke ili estis veraj fratoj, ĉar mi ilin amis kvazaŭ ili estis tiaj.

Sed mia patrino, centrigante en mi la senliman amegon, kiun ŝi havis por sia unua edzo, gardadis nur por mi ĉiujn delikataĵojn de sia nobla koro.

Filoj ŝiaj estis ankaŭ la aliaj, kaj tamen, mi ŝciis, mi divenis, ke filo de ŝia koro kaj de ŝia sango, neniuj, krom mi povis nomiĝi. Kun mi ŝi ludis patrinan rolon; kun miaj duonfratoj nur virinan. En ĉiu vidvino kun filoj kiu reedziniĝas ekzistas patrino kiu postviviĝas. La nova edzina amo, vidvinon eble mortigi povos, sed kontraŭ patrino povos ĝi nenion.

y perderlo. Por más que me proponga, no puedo olvidarlo. Salen lágrimas á mis ojos y mi voz se enronquece. Después de todo era mi madre, y madre no se tiene más que una.

Me quería con adoración, se murió y con ella se acabaron mis venturas. Todavía algunas noches, cuando tardo en dormirme y doy mil y mil vueltas en el lecho, abriendo los cansados ojos veo en la obscuridad de la alcoba su figura, aquella figura que, dibujada con sutiles trazos de luz me mira como diciéndome: ¡hijo mío!

Estos momentos, y estas ideas y estas visiones no pueden contarse, vale más olvidarlas, Todos dicen del que las refiere: ¡es un poeta! Y unos le tienen lástima, mientras otros le miran con desprecio.

¡Ay madre mía! No le contaré á nadie tu inmenso cariño. ¡Siempre el eterno amor será para este mundo miserable, el eterno secreto!

No tenía de su primer matrimonio más hijo que yo. Después las necesidades de la vida, la falta de amparo y su desvalida juventud le obligaron á casarse otra vez.

Mi padrasto me consideraba como hijo propio, y ningún rencor conservo hacia su memoria. Tuve cuatro hermanastros, cuatro hermanos en realidad, pues como tales los conceptuaba y como tales los quería.

Pero mi madre, cifrando en mí el cariño sin límites profesado á su primer marido, guardaba todas las delicadezas de su corazón para compartirlas conmigo.

Hijos suyos eran también los demás, y sin embargo, yo sabía, yo adivinaba, que hijo de su corazón, de su sangre, nadie más que yo podía apellidarse. Conmigo era la madre, con mis hermanastros la mujer. En toda viuda con hijos que vuelve á casarse, hay una madre que sobrevive. El nuevo amor de esposa podrá matar la viuda, però la madre, ese no la mata.

Ni kunvivadis en tre malbona stato, preskaŭ limiĝanta je la mizero. Multajn fojojn lerte evitante ĉeeston de siaj aliaj filoj, mia patrino min prenadis kaj diris: —Josefo, Joĉjo, kiel malfeliĉa mi estas!

Tuj ŝi metis sian buŝon sur mian vango, kaj paŭzaj kaj densaj larmoj, kiuj silente faladis el ŝiaj okuloj, tuŝis dolĉege mian vizaĝon por iri sur ĝi malrapide iom post iom, perdiĝante, sekiĝante...

Kiam ŝi ekmalsaniĝis kaj mi alproksimiĝis al ŝia lito demandante, kio al vi okazas, patrino?, ŝi respondis:

—Kara filo mia, mi mortas!

La larmoj kiuj, tion aŭdinte, amasiĝis en mia gorĝo, malpermesis al mi respondi:

—Kio okazos al vi, ŝi daŭrigis dirante al si, dum la okuloj ŝiaj grandaj, grandegaj okuloj, kiujn la malsano grandigis, rigardadis fikse kaj obstine, angulon de apuda muro.

—Vi, mort! Kiom da sensencaĵoj vi parolas!—fine mi povis diri; kaj tiam ŝi respondis per tiel paŭza kaj tiel stranga voĉo kiu ŝajnis al mi eliranta el tombo:

—Serĉu, mia filo en kesteto de tiu tablo, oreljuvelojn kiujn via patro donacis, al mi en la tago de nia edziĝo. Ornamu min per ili, ĉar mi ja iras akompani lin kaj tiamaniere mi mortas tre rezignacie.

Mi trovis la oreljuvelojn kaj per tremanta mano mi metis ilin tra ŝiaj palaj oreloj.

—Nun—ŝi daŭrigis—vi atentu, Josefo, mia filo, kaj neniu aŭdu pri tio, kion mi diros al vi. Vi ja estas deknaŭ-jara junulo, kaj por vin liberigi el militservado mi klopodis ŝpari monon. Sekrete mi posedas dudek-sep durojn. Mi ilin amasiĝis peseto post peseto. Prenu ilin, ili tie kuŝas, en ligna kaveto, sub tiu vestaĵo. Tuj prenu ilin por ke mi havu plezuron ilin vidi en via mano. Tiel... bonege... nun mi jam trankvile povas morti. Lastan kison. Diru al viaj fratoj ke ili povas tien ĉi eniri. Laboru, mi petas, por pleniĝi la kvanton. Alian kison... alian... pli ankoraŭ; kaj mia malfeliĉa patrino mortis dum mi kisadis ŝin varmege.

Vivámos en una estrechez rayana á la miseria. Muchísimas veces esquivando la presencia de sus otros hijos, cogíame mi madre y me decía: ¡José, Josefito, qué desgraciada soy!

Luego aplicaba su boca á mi mejilla, y las lágrimas densas y pausadas que silenciosamente caían de sus ojos, dában dulcemente sobre el cútis de mi rostro para ir despacio, poco á poco, perdiéndose, secándose...

Cuando cayó enferma y yo me acerqué á su cama preguntando:—¿Madre, qué tienes?—me respondió:

—¡Pobre hijo mío, que me muero!

Las lágrimas que se agolparon á mi garganta no me dejaron responder:

—¿Qué va á ser de ti?—continuó diciendo ella, mientras sus ojos, sus grandes, sus inmensos ojos que la enfermedad agrandaba, miraron fija y obstinadamente la pared fronteriza.

—¡Morirte! ¡Qué tonterías dices!—pude al cabo contestar, y ella me dijo con palabra lenta y voz como salida de un sepulcro:

—Busca, hijo mío, en el cajón de aquella mesa unos pendientes que tu padre me regaló cuando nos casamos. Pónmelos, puesto que voy á buscarle, y así me moriré resignada.

Busqué los pendientes y con mano trémula los coloqué en sus exangües orejas.

—Ahora—dijo—escucha, José, hijo mío, y que nadie nos oiga lo que voy á decirte. Tú tienes ya diecinueve años; yo quería ahorrar dinero para librarte del servicio. Tengo veintisiete duros escondidos. Los he reunido peseta á peseta. Cógelos, están allí, en un hueco hecho en la madera, debajo de aquella ropa. Cógelos, que yo los vea en tu mano. Así... muy bien... ahora puedo morirme tranquilamente. Un último beso. Dí á tus hermanos que entren. Trabaja para completar la cantidad. Otro beso... otro... otro aún; y mi pobre madre murió mientras yo la besaba ardientemente.

Post du monatoj, kiam ankoraŭ ĉirkaŭis mian kolon la nigra kravato pro morto de patrino, el tiuj dudek-sep duroj kiuj je tiaj grandaj deziregoj estis amasigitaj, restis en mia poŝo eĉ nek la plej sensignifa menero.

Ĉion forprenis al mi en noktoj de malsobrego, virinoj false amantaj; kaj nun ke pro diversaj kaŭzoj okazantaj en vivado mi estas la sola posedanto de grandega monhavo, kiam malfruiĝas mia dormo kaj tute nesciante kaŭzon moviĝas kaj removiĝas mia korpo en la lito, mi malfermas tiam la lacegajn okulojn kaj mi vidas en senlumeco de la ĉambro karan figuron ŝian, tiun figuron desegnitantan per lumaj maldiketaj skizoj kiu, rigardante min per malgajaj okuloj, ŝajnas diri al mi:

—Kion vi faris je tiu trezoro, kiun per tiel grandaj penegoj mi amasis?

Tiam mi kovras mian kapon per kuseneno, kaj mi aŭdas karesan voĉon, kiu murmuretas malgajege:

—Malfeliĉa filo mia!

Tradukis: RUFINO UNZAGA (Esp. n.º 3.514).

Dos meses después, anudado aún á mi garganta el pañuelo negro del luto de mi madre, ya de aquellos 27 duros, con tantas ansias reunidos, no quedaba en mi bolsillo ni la más pequeña cantidad.

Todo se lo llevaron en noches de embriaguez mujeres falsamente cariñosas, y hoy, que por diversas circunstancias que ocurren en la vida me encuentro dueño de una considerable fortuna, cuando tardo en dormirme y sin saber la causa doy mil y mil vueltas en el lecho, abriendo los cansados ojos veo en la obscuridad de la alcoba su querida figura dibujada con sutiles trazos de luz que me mira con sus ojos tristes como diciéndome:

—¿Qué has hecho de aquel tesoro que con tantos afanes reuní?

Escondo entonces la cabeza bajo la almohada y oigo una voz cariñosa que murmura tristemente:

—¡Pobre hijo mio!

Sentencaj diroj kiujn Bertoldo skribis

ANTAŬ SIA MORTO

- Kiu al kutimis manĝi rapojn, ne manĝu kukojn.
- Kiu estas kutimigita uzi fosilon, ne prenu ponardegon.
- Kiu estas kamparano, ne iru kortegon.
- Kiu venkas sian apetiton, tiu estas grava kapitano.
- Kiu je ĉio ne manĝas, tiu ne estas bona simiino.
- Malkonfidu je tiu, kiu rigardas la sunon kaj ne ternas.
- Kiu ĉiutage al si vestas novajn ŝtofojn, ĉiu hore disputas kun sia tajloro.
- Kiu forlasas siajn aferojn por atenti tiujn de aliaj, tiu ne estas saĝa.
- Kiu volas ĉiujn saluti baldaŭ rompuzas sian ĉapelon.
- Kiu punas sian edzinon, ebligas murmuron de la najbaroj.
- Kiu elspezas laŭ sia havo neniam estos almozulo.
- Kiu skrapas la skabion de aliaj, freŝigas la sian.

- Kiu promesas en kampo, devas efektiviĝi sian diron en urbo.
- Kiu timas la birdojn, ne semu falarion.
- Kiu imitas la riĉulon, restos senriska en sia hejmo.
- Kiu vojaĝas, portu bastonon en la mano kaj panon kaŝitan sur la brusto.
- Kiu kredas pri songĝoj, fondas sian penson sur nebulo.
- Kiu esperas en la tero, malproksimiĝas de la ĉielo.
- Kiu zorgas siajn manojn, ne iru en tinkturejon.
- Kiu nur donas al vi konsilojn povante al vi helpi, tiu ne estas bona amiko.
- Kiam oni punas la hundinon, certe la hundo forestas.
- Kiu imitas la formikon en la somero, tiu ne bezonos pruntpreni panon en la vintro.
- Kiu ĵetas ŝtonon al la ĉielo, tiu ĝin ricevas sur sian kapon.
- Kiu alestas festenon kaj ne scias danci, tiu por nenio taŭgas kaj okupas lokon.
- Edzo kiu edziĝas pro la havo de sia edzino, akiros monpoŝon sed ne virinon.
- Kiu donas la hejman mastrumadon al la virino, tiu ĉiam trovos pinglojn ĉe la pordo.
- Kiu ne povas kunporti sian haŭton, tiu estas malfeliĉa ŝafido.
- Kiu ĝuas posedaĵojn maldece akiritajn, ĉe sia morto trovos la respondan punon.
- Kiu laŭdas alian, nekonante lin, multafoje mensogas.
- Kiu donas panon al malpropraj hundoj, ricevos bojojn de la propraj.
- Kiu ne pagas la ŝvitpenon de malriĉulo, tiu ne agos kiel honesta homo.
- Kiu manĝas laŭ deziro de alia, neniam manĝas profite.
- Kiu kaŝas sian sciadon, tiu ofte estas la plej lerta.
- Kiu volas korekti la aliajn, tiu donu bonan ekzemplon pri li mem.
- Kiu foriras de la teraj plezuroj, tiu nur ĝuas la ĉielajn donacojn.
- Kiu ne havas amikojn, estas kvazaŭ korpo sen animo.
- Kiu parolas antaŭ ol pensi, tiu ne estas saĝa homo.
- Kiu elirante el sia domo pensas pri tio kion li estas faronta, tiu ĉe sia reveno trovas finitan sian aferon.
- Kiu donas tion, kion li promesis, tiu donas dufoje.
- Al tiu kiu pekas kaj pekigas aliajn, vi vidos suferantan samtempe du pentofarojn.
- Kiu ne taŭgas por si mem, malpli taŭgas por la aliaj.
- Kiu volas sekvi la virton, forlasu unue la malvirton.
- Kiu deziras, kion li ne esperas havi, tiu al si mem neas la peton.
- Kiu havas en sia domo bonan vinon, tiu havas la trinkfelsakon ĉe la porto.
- Kiu elektas batalilojn, tiu volas batali pro utilo.
- Kiu vojaĝas tra la maro de la volupto, tiu elŝipiĝos en la havenon de la mizeroj.
- Kiam iu malĝojiĝas pro bonaĵo de alia, aliaj vidas je lia malbono.
- Kiu havas virton ĉe sia flanko, neniam trovas danĝeron en vojaĝo.

Anekdotoj

Post ŝippereo, kelkaj homoj, kiuj per naĝado eliris sin el mortdanĝero, alpaŝis en insulon ŝajne senhoman. Kiam ili estis longe marŝintaj sur ĝi, unu el ili, ekvidinte pendigiton, ekkriis: «Ho! dank'al la ĉielo, jen ni staras en civilizita lando».

(*Choix d'anecdotes.*)

En la tempo kiam, en la kortego kaj vilaĝoj, oni plej varme atakis aŭ defendis la konduton de niaj ŝiparestroj, kaj dume oni bedaŭris, ke iliaj klopodoj estas tute vanaj, S-ro de Maurepas, pli juna ol ni, moke parolis pri tiuj gravaj aferoj, kiuj prezentis al li okazon por multenombraj vortludoj.

«Ĉu vi scias, diris li, kio estas surmara batalo? Mi tuj raportos al vi. Du militŝiparoj deiras el du kontraŭaj havenoj: ili manovradas kaj poste renkontiĝas; oni pafadas ambaŭflanke, kelkaj mastoj defaliĝas kaj kelkaj veloj disŝiriĝas: oni mortigas homojn kaj malŝparas kuglegojn kaj pulvon; poste, la du mararmeoj foriras kaj ĉiu el ili pretendas samtempe, ke ĝi restis mastro de la batalkampo kaj venkis la alian: oni kantas ambaŭflanke *Te Deum*, kaj dume la maro ne fariĝas malpli sala ol antaŭe».

(*Comte de Ségur, Memoires.*)

La Grabielli, fama kantistino, postulis 5,000 dukatojn de la imperiestrino, kiel pago por kantadi du monatojn en Petersburgo. La imperiestrino tiam respondis: «Mi ne salajropagas tiom multe eĉ miajn ĉefmarŝalojn (feldmarŝalojn)». «Tiaokaze, rediris la Grabielli, via imperiestrina Moŝto, nur devas kantigi siajn ĉefmarŝalojn». La imperiestrino pagis la 5,000 dukatojn.

(*Chamfort.*)

El la lingvo franca tradukis, V. INGLADA.

NIAJ VIZITANTOJ

N.^o 12, 1904, kaj 13, 1905.—**Internacia Sciencia Revuo.** 27, boulevard Arago, Parizo, (*Francujo*). Jarabono; 7 fr.

N.^o 18, 1905.—**Espero Katolika.** A Sainte Radegonde près Tours (*Indre et-Loire, Francujo*). Jarabono, 2,50 fr.

N.^o 20, 1905.—**The Esperantist.** 67, Kenington Gardens Square, W., London. Jarabono, 4 fr.

N.^o 6, 1905.—**The British Esperantist.** 1, street, Strand, Londono. Jarabono, 2 frankoj.

N.^o 10-11, 1905.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, Lima (*Peruo*). Jarabono, 3 frankoj.

- N.º 2 kaj 3, III jaro, 1905.—**Juna Esperantisto**. 9, avenue des Vollandes, *Genevo* (*Svisujo*). Jarabono, 2 fr.
- N.º 120 kaj 121, 1905.—**Museo Exposición**. Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.
- Mar.-Ap. 1905.—**La Meksika Lumturo**. *Sta. Rosa, Necoxtla, Veracruz* (*Meksio*). Jarabono, 3 fr.
- N.º 3, 1905.—**Svisa Espero**. 6, vieux College, *Genevo* (*Svisujo*). Jarabono, 2,50 fr.
- N.º 6-2.^a jaro, 1905.—**Germana Esperantisto**. Prinzentrasse, 95, *Berlin S.* (*Germanujo*). Jarabono 3 markoj.
- N.º 7, 8 kaj 9.—**La Alĝera Stelo**. 57, rue d'Isly, *Alĝer* (*Alĝerujo*). Jarabono, 3 fr.
- N.ºj 99 kaj 100.—**Revista del Ateneo Obrero Manresano**. Borne, 13, *Manresa*. Sendpage al la protektantoj. Unu numero, 0,10 pesetoj.
- N.ºj 79, 82 kaj 84.—**La Revue de l'Esperanto en Le Cicerone**. 102, rue de la *Paix, Boulogne sur-mer* (*Francujo*). Jarabono, 10 fr.
- N.º 10.908.—**La France du Nord**. 37, rue Thiers, *Boulogne-s-m* (*Francujo*). Jarabono, 28 fr.
- N.º 3.—**Espero de Katalunjo**. Presejo Lamiot, *Ceret* (*Francujo*). 0,05 numero.
- N.º 119 kaj 120.—**Lingvo Internacia**. 33, rue Lacedéde. *Paris*. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.
- N.º 1.—**Ruslanda Esperantisto**. S. Petersburgo, Bolš. Podjačeskaja, 24. *Rusujo*. Unu numero 30 kopekojn.
- N.º 1.—**Gefrataro Esperanta**. Napolo, Largo Gesu e Mario, n.º 4. *Italujo*. Jarabono, 4 fr.
- N.º 1.—**Esperanto**. 71, Michelet, Le Havre, *Francujo*. 24 numeroj sinsekvaj, 3 frankoj.

SOLVO AL PROBLEMO DE LA N.º 18^a

Alĝluu la bordojn A B kaj C D tiamaniere ke angulo A estu sur C kaj B sur D.

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

Sinjoro A. C. Body, 34, *Greenbank-Avenue, Plymouth* (*Anglujo*) deziras korespondadi kun fremdaj geesperantistoj. Ĉiam tuj respondos.

S-ro *Vrtel Francisko*, termezuristo, oficisto en Bruno, Elisabetpol, 4, *Austrio, Moravio*. Deziras interŝanĝi belajn, se eble koloritajn, poŝtkartojn kun gesamideanoj.

Emilio Marconell, pastro.—*España* (provincia de Teruel) *Gea*. Deziras korespondadi esperante per ilustritaj poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun geesperantistoj el ĉiuj landoj.

Tatmonda Jarlibro Esperantista, enhavanta la Adresaron de D-ro Zamenhof. (Anuncio universal esperantista, conteniendo la colección de direcciones del Dr. Zamenhof para 1904). Nueva colección completa y revisada, conteniendo: 1.º La lista de los esperantistas del mundo por países y poblaciones. 2.º Las sociedades y diarios esperantistas de todo el mundo. 3.º La

colección de direcciones del Dr. Zamenhof para 1905. 4.º Una lista alfabética completa de los 20.000 principales esperantistas del mundo. —Un tomo en 16.º, en rústica, 2'50 fr.—Hachette et C.^{ie}, 79, boulevard S. Germain, París.

HISPANA JARLIBRO ESPERANTISTA enhavanta la regularon de Hispana Societo por propagando Esperanto, la protokolojn de la kunsidoj okazintaj dum la jaro 1904, la nomaron de ĉiuj hispanaj esperantistoj kaj iliajn nunajn adresojn —0,25 pesetoj kun poŝtkosto kaj 0,55 se oni dezirus ĝin ricevi pt—rekomenditan. Fara la mendojn ĉe la Administrejo de LA SUNO HISPANA aŭ al S-ro Manuel Benavente, Sociedad, 14, Murcia (Hispanujo). La membroj de H. S. p. p. E. ricevos ĝin senpage kontraŭ la sendo de ilia kotizaĵo por 1905.

Sociedad Española para la propagación del Esperanto.—*Presidente*, D. Ricardo Codorniu, Ingeniero Jefe de Montes. Paseo del Malecón, C, Murcia.—*Secretario*: Ricardo P. Antonio Guinart, Escuelas Pías, Valencia.—Cuota anual: 1 peseta.—*Informes al Secretario*.

EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA—Sociedad, 14—Se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto, de las que se publican en la actualidad y de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto.

Diccionario esperanto español de raíces, una peseta; Gramática, 0,75; cuadro de palabras correlativas, 0,05; enumeración y significado de los afijos, 0,20; ejercicio de traducción, 0,50.—RVDO. P. ANTONIO GUINART—ESCUELAS PÍAS—VALENCIA.

L' Esperantiste oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de esperanto, 20 paĝoj (formato 15×20) da tekstoj francaj esperanta kun ok paĝoj de kovrilo, internacia korespondado esperanta, senpage, 3 fr. 50 por unu jaro. 4 fr. kun enskribo en la societeton. Turnu vin al *Administration de «L'Esperantiste»*, Louviers (Eure) France.

LONDONO Pensio por gesinjoroj. Hejmaj komfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni paroladas kaj korespondadas en esperanto, angla kaj franca lingvo. **Sinjorino O'Connor**, *Esperanto House, St-Stephen's Sq. Bayswater, 20*.

ESPERANTO Manual y ejercicios, 3 pesetas.—**Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto**, 6 pesetas. Por INGLADA Y LÓPEZ VILLANUEVA.—En las principales librerías de España y América y en la Secretaría de H. S. p. p. E.—Escuelas Pías—Valencia.

Ni translokis la Administracion de nia gazeto kaj ni petas, oni adresu la korespondajojn, abonojn kaj ĉiujn aferojn, al sinjoro Administranto de «La Suno Hispana»—Godella—Valencia (España).

Hemos trasladado la Administracion de nuestro periódico y rogamos que se dirija la correspondencia, abonos y todos los asuntos, al señor Administrador de «La Suno Hispana»—Godella—Valencia (España).